

| | | |
|--|---|---------------------------------------|
|  | <h1>PENSEO</h1> | <i>N-ro 206</i> <i>dec. / 2008</i> |
| | Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994 | |
| Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 19-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm | | |

Vejdo

Kelkaj Ĉineskaj Poemoj

de Maŭ Zedong

Flirtanta Verda Flago

Maŭ Zedong (1893-1976)

Okaze de Z-Festo 2008

—laŭ ĉinesko Shuidiaogetou

jam ne en sonĝo
 nia afero
 koketis pompe per
 bela ekstero
 verda flago flirtas
 impone inspire
 jen kun espero
 kaj kuraĝigo
 sur vasta tero

 jam tempo
 alvenas
 en vero
 por atingi
 la celon de prospero
 la tutmond-verdiga
 de majstro Zamehof
 nun kun fiero
 antaŭen marŝu
 trans bariero

Nego

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun*

En nordlando
 neĝas vaste
 ŝlosas glaci'.
 Cis kaj trans Mureg'
 kovras blanko.
 Haltas torent'
 sen energi'.
 Montserpentoj
 elefantoj
 vaksaj altas kun pasi'.
 Sub sunlum'
 ĉi' en ruĝa vest'
 ĉarmas des pli.

Antaŭ pejzaĝmagi'
 bravuloj
 falus kun vekri';
 imperiestroj
 hontus en stil'
 aŭ lamentus
 pri verk-graci';
 kaj fiera
 Ĉengis-Ĥano
 nur lertus en pafmeti'.
 Ĉiuj for!
 Veraj herooj
 nun inter ni.

**Qinyuachun: ĉina fiskforma poemo el du strofoj
kun 12 kaj 13 versoj respektive de 444, 5444, 447, 354 /
6, 35, 5444, 447, 354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa, xxxa,
xxa , xxa / a, xa, xxxa, xxa, xxa (x=senrima)*



Tri Poemetoj

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Mont’
rajdvipas mi kun volont’.
Kapturene,
jam ĝis ĉielfront’.

Mont’
kiel ruliĝanta ond’,
impetas
en batala rond’.

Mont’
enpikas en horizont’,
jen kvazaŭ
volb-subtenanta fond’

**Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el 4 kvar
versoj de 1,7,35 silaboj laŭ rimaranĝo aaxa (x=
senrima)*

Changsha

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun*

en aŭtunfrost’
ĉe insulet’
alnorda flu’

ruĝe farbitaj
dekmil montoj
jarda river’
veloj sur blu’
agloj ŝvebas
fiŝoj naĝas
jen strebe al liberĝu’
en vastaj’
kiu ja regas
jen mia ĉu’

ope por rendevu’

ni venis

en temposinu’

ni kunlernantoj

junaj, vervaj

seriozaj

sen ambigu’

kaj kritikis

kaj komentis

pri ranguloj de enu’

en memor’

ni naĝe pelis

barkojn per sku’

***Qinyuachun: ĉina fiskforma poemo el du strofoj
kun 12 kaj 13 versoj respektive de 444, 5444, 447, 354 /
6, 35, 5444, 447, 354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa, xxxa,
xxa , xxa / a, xa, xxxa, xxa, xxa (x=senrima)*

Umefloro

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

Printemp’ alvenas

Kun neĝ’ leĝera

En glacio gracilas
vi flor' fiera.

Ne vete pompas
herold' vi vera.
Ĝis montfloroj buntas, vi
ridas espera.

**Busuanzi: ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 55,75 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa (x = senrima)*

Dabodi

—laŭ ĉinesko Pusaman*

l' arkon buntan de ĉiel'
kiu svingadas por bel'?
sub postpluva sun'
montoj verdas en kun'

batal' en vilaĝ'
kugl-trua pejzaĝ'
monton ornamas
ĝi des pli ĉarmas

**Pusaman: ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 77,55 / 55,55 laŭ para rimo.*

Zhuang Qixiong



Maŭ Zedong

I.

—laŭ ĉinesko Chaozhongcuo*
Kun grandioza stilo

kaj sankta brilo
Vi skribis poemojn
per ritma fusilo

Dekmil lia
Longa Marŝo—
dolĉa trilo

Montoj kaj riveroj
kantis de jubilo.

**Chaozhongcuo: ĉina fikforma poemo el du strofoj*

kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,66 / 444,66 laŭ rimaranĝo aaxa / xxaxa (x = senrima)

II.

—laŭ ĉinesko Taoyuan Yiguren*

Kun strategiista ŝtal'
mediti pri batal';
Sur dorso de eval'
marŝi en rival'.

Bonodori flav-petal'
kun aparta signal',
kiel sanga sunfal'—
plej bela regal'.

**Taoyuan Yiguren: ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7665 silaboj laŭ rimaranĝo aaaa*

III.

—laŭ ĉinesko Dielianhua*

Vi iam fumis ĝoje
kaj rigardis
supren levkape
al anser' sovaĝa tre
suden kun brila ide'.

Sed torentis rivere
en vasta mens'
kiel nova kre'.
ŝtorm' sin levu subite.
por ver-heroa trofe'!

**Dianlianhua: ĉina fikforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj laŭ rimaranĝo axaaa (x=senrima)*

IV.

—laŭ ĉinesko Shanhuazi*

Vi en neĝa vilaĝo
al nord-landa pejzaĝo
senbride revis pri la
vojaĝo.

Pensoj flirtis en ĉiel'
kun poezia saĝo
per genimilitista

